

侯志平主編『中国世界語運動史』、新星出版社、北京、2004年

Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado によせて 佐々木 照央

本書は北京でのエスペラント世界大会を記念して出版されたものである。これはエスペラント語と中国語の両方によって書かれ、その両方の言語を勉強する者にとっては垂涎の贈り物である。そればかりではない。内容が極めて興味深い。

中国語でエスペラントは「世界語」である。これは二葉亭四迷が日本最初のエスペラント語教科書に使った書名だ。「世界語」が中国生まれの用語か、日本生まれかは研究の余地があろう。ただ、日中のエスペラントの歴史が密接な関係にあったことを、この「世界語」という呼称が示している。中国におけるエスペラントの種子はロシア、欧州、日本を經由して蒔かれた。そのうち、日本経由のものは極めて重要な種子であり、独特の思想運動と結合していた。これまでその思想は「無政府主義（アナキズム）」と呼ばれていた。しかしながら、その呼称では抜け落ちてしまう恐れのある重大な思想運動がそこに含まれていた。それは「ヴ・ナロード」の思想運動、ナロードニキ主義である。中国の世界語運動は「人民の中へ」の運動であった。本書も含め従来の史書にはこの視点が欠如していた。

周知のとおり、中国人留学生の指導的部分は大杉栄にエスペラントの手ほどきを受け、彼が訳したクロポトキンの『青年に訴う』に甚大な感化を受けた。この文書はアナキズムの思想を伝えたというよりも、むしろ「ヴ・ナロード」の思想、すなわちラヴローフの『歴史書簡』に書かれた「人民に対する負債」の念を凝縮して盛り込んだものであった。この訴えに応じて医学生魯迅は社会を治療する医者になる。ロシアのナロードニキはバクーニン派（アナキスト）のみならず、ラヴローフ派（啓蒙宣伝）やトカチョフ派（帝政転覆・政権奪取）などを含む広汎な社会変革の志士であり、無政府主義よりもはるかに広い諸サークルによる社会変革運動であった。クロポトキンはチャイコフスキサークル員だった。中国で展開された「世界語」運動の志士は国民党にも共産党にもいた。バクーニン派に近い無政府主義者もいたであろうが、それ以外のものも多かった。さらに、それは中国各地に世界語サークルを形成し学習者を育成した。まさに中国版「人民の中へ」の運動とってよい。

中国の「世界語」運動の志士は中国語改革を志向した。複雑化した漢文、方言を普通語に統一する運動、ローマ字化運動に彼らは直接に関わった。人民の教育にそれが不可欠であったからである。世界語の簡潔さは中国語改革の触媒となった。現在中国のどんな僻地にいっても普通語が通じる。また中国語によってワープロ入力ができる。これはローマ字化、つまりピンインのおかげである。このローマ字化に世界語運動者たちが参加した。中国のエスペラント運動が祖国解放運動と結合し、世界への直接のメッセージの伝達手段として利用され、歴史的な役割を担ってきた。現在でもエスペラント放送があり、私も毎日聞いている。日本では憲兵甘粕正彦ごときに虐殺された大杉栄が世界語とナロードニキ主義を伝えたことで死後も中国に豊かな種を蒔き、豊穡な実りを生んでいることを思えば、感慨無量である。今回はその初期の日中世界語交流の一端を紹介しておこう。

En Ĉinio enfluis Esperanto tra 3 ĉefaj vojoj: Rusa, Eŭropa kaj Japana. Tra Rusio, ĉ. 1891 Rusaj komercistoj kunportis E-librojn en la urbon Harbin. En 1891 fondiĝis la Esperanto-Klubo “Pacifiko” en la urbo Vladivostoko, Rusio. La klubo eldonis Esperanto-lernolibron kun klarigoj en 12 lingvoj, inter kiuj troviĝas la ĉina. Laŭ rememoro de iu maljuna esperantisto, rusaj komercistoj, sciantaj Esperanton, portis la libron al la urbo Harbin kaj fondis E-kurson. Hutabatei Ŝimej eklernis Esperanton en Vladivostoko, kie estis eldonita la Esperanto-lernolibro kun ĉina lingvo. Mi devos esplori, ĉu termino “世界語” estis uzata tiam, aŭ ne. En 1904 Lin Zhenhan 林振翰 memlernis Esperanton. En 1905 rusa esperantisto fondis en Ŝanhajo E-kurson, kaj tie de li lernis Lu Shikai 陸式楷 kaj aliaj. En 1906 s-ro Lu organizis la Ŝanhajan Esperanto-Klubon kaj vesperlernejon por lernigi Esperanton.

Tra Japanio. En 1907 ĉinaj studentoj Liu Shipei 劉師培, Zhang Ji 張繼, He Zhen 何震, Jing Meijiu 景梅九, Qian Xuantong 錢玄同 kaj aliaj en Japanio lernis Esperanton ĉe Oosugi Sakae 大杉栄, kaj eldonis en Tokio la revuojn *Egaleco* 『衡報』 kaj *Justeco* 『天義』 por diskonigi narodnikiismon kaj ankaŭ Esperanton. En 1908 artikolo en la *Egaleco* diras jene: “Ĝi estas la unua gazeto en Azio, kiu pledas por Esperanto kiel la plej facila interkomprenigilo de diverslandaj revoluciuloj.” (Ulrich Lins). La revuo *Justeco* ofte aperigis notojn pri Esperanto kaj Esperantajn lernomaterialojn. Reveninte al sia patrujo en 1908, Liu Shipei kaj aliaj fondis en Ŝanhajo E-lernejon, kiu funkciis nelonge. Kvankam Liu Ŝipei tuj poste konvertiĝis al la subtenanto de Qing Dinastio, lia agado kiel Esperantisto havis fortan influon al ĉinaj samideanoj.

Laŭ Liu Shipei la konfliktoj en la mondo okziĝas ĝis nun pro du kialoj. Unu pro vivteno, alia pro sento. Problemo de vivteno estas neegaleco de posedaĵoj, kaj problemo de sento – senunuco de lingvoj. Por likvidiĝo de kialoj de konfliktoj necesas egalo de posedaĵoj kaj unuiĝo de lingvoj, tio estos ebla per enkonduko de komunismo kaj Esperanto.

Malkomuniko inter diversaj lingvoj fariĝas ankaŭ kialo de konfliktoj interne en Ĉinio. Tie estas ne komuniquebla transe unu monto, pro tio bataloj inter komunoj ofte okazas. Nur lernado de iom da lingvoj aŭ dialektoj ne helpas solvi radike konfliktojn inter ŝtatoj aŭ provincoj. Laŭ Liu Shipei, “se ĉinoj volas regi patrolandan lingvon, ili devas lerni ofican lingvon, se ili volas ellerni fremdajn lingvojn, ili bezonas eklerni unue Esperanton”.

Liu Shipei postulis ke Esperanto estu devigota en ĉinaj lernejoj, ĉar inter Esperanto kaj aliaj eŭropaj lingvoj estas multe da komuneco, tial tio estas tre konvena por lernado de aliaj lingvoj en la futuro. Sed tiam en Ĉinio ne sufiĉis la kondiĉo por disvastiĝo de Esperanto. Obstaklo estas malmulteco de instruistoj kaj libroj. Liu Shipej proponis ke oni organizu kurson en Tokio sub japanaj instruistoj kaj en Ŝanhajo sub samideanoj,

koncerne al libroj ĉinaj samideanoj kompilu vortarojn, gramatikolibrojn, krestomatiojn. En Tokio lia propono estis plenumita per fondiĝo de kurso, kiun kondukis fama Oosugi Sakae.

En 1906 Oosugi Sakae estis arestita kaj, sidante en malliberejo kiel juĝoto, li skribas en unu el siaj leteroj:

“Mi ne scias ĝis kiam mi sidos ĉi-tie, sed dum prizono mi volas nepre posedi Esperanton plene kaj germanan lingvon iomete.” (dato nekonata)

En la malliberejo(Iĉigaya) Oosugi eklernis Eseranton pere de koresponda eduko, organizita de s-ro Gantlet, instruisto en la 6-a alta lernejo en Okajama. “Unu aresto – unu lingvo” - tio estas lia principo. Nur poste, li eliris laŭ kaŭcia liberigo kaj geedziĝis al Hori Jasuko. Li tuj poste la liberiĝo el prizono publikigis serie artikolojn pri Esperantao en la revuo de Tokia Instituto por fremdaj lingvoj. Tiam la unua kongreso de Japana Esperanta Asocio estis okazigita en la Kanda Domo de junuloj 28-n de septembro. Oosugi Sakae ĝojigis ĉeestantajn spektantojn per Japana fabelo “Momotaro”(Knabeto persika) en Esperanto. Antaŭ la kongreso li malfermis Esperantolernejon en la elementa lernejo Ŝusei sur la strato Hongo Ikizaka 17-n de septembro. Ĝi estas la unua Esperanta lernejo en Japanio. Eĉ ĉinoj ĉeestis en la Esperanta kurso, sed krome tio Oosugi speciale malfermis Esperantan kurson por ĉinoj. Oosugi estis arestita pro la publikado de “La Apelacio al junuloj” de Kropotkin en 1907. Kropotkin skribis en ĝi la ideologion de Rusaj Narodnikoj: “V Narod! En Popolon!” La ĉinaj junuloj en Japanio forte estis kortuŝitaj de ĉi-tiu devizo. En la persono de Oosugi estas unuigitaj Esperanto kaj la devizo de Kropotkin “En Popolon!”.

Laŭ la artikolo en la unua numero de la “*Egaleco*”, la unua kurso komencis ĉe la domo de Liu Shipei 4-an de aprilo en 1908 kaj ĉi-tie estas instruata en ĉiuj lundoj, merkredoj kaj vendredoj desde 4-a horo ĝis 5:30. En la 2-a numero estis publikigita vorto de Oosugi pri malfermo de Esperanta kurso, dirinta ke Esperante povos legi ĉiujn specojn de frazoj dum 3 aŭ 6 monatoj la lernintoj anglan lingvon, se ne lernantoj anglan bezonas duoble por ellerni.

Laŭ mia sperto 8 fojoj de kurso(90 min.) estas sufiĉa por legi fabelojn de Andersen, kompreneble kun vortaro. Ĉinaj junuloj, eble, povas ellerni Esperanton dum tri semajnoj. Ĉeestintoj ĉinoj estis 20, el ili troviĝis Liu Shipei, He Zhen, Zhang Ji, Su Manshu, Jing Meijiu.

Post tio oni planis organizon de somera lernado ekde 1 julio ĝis 15 aŭgusto, kies instruisto devus esti Oosugi, sed li estis arestita en julio, tial anstataŭis s-ro Ĉihu Tosio kiel instruisto. Sed tuj poste Zhang Ji en Tokio daŭris E-kurson en la redakcio de la gazeto *Min Bao* (民報 Popola Raporto), kaj en ĝi lernis Esperanton s-roj Song Jiaoren 宋

教仁, Zhang Taiyan 章太炎, Zhu Zhixin 朱執信, Lusin 魯迅, Zhou Zuoren 周作人, Tang Zengbi 湯增璧 kaj Su Manshu 蘇曼殊. Povas diri, ke Lusin kaj Zhou Zuoren, famaj fratoj, fariĝis Esperantaj nepo-disĉiploj(孫弟子) de Oosugi. Jing Meijiu skribis pri lernado sub gvido de Oosugi sekve:

“Iam sekreta kunsido estis organizita sur unua etaĝo de ia domo, policanoj trovis tion kaj multaj ĉeestantoj estis forpelita sur la tero. Mi, ignorante tion, lernis ĉe s-ro Oosugi kiel legi Esperanton kaj penis korrektigi sian prononcon per ĉiuj fortoj.” (*Memoro de vivo en Japanio*).

Socialista interfluo inter japanaj kaj ĉinaj estis realigita sur la areno de la socialisma kurso 社会主義講習会. En la raporto per la Japana Publika Sekureco 公安報告“La revoluciuloj de Qing Dinastio kaj socialismo” diris:

“Ĉar inter Zhang Ji, Liu Guanghan(Shipei) k. a. kun japanaj socialistoj ne sufiĉe estas komnikebla, ili ne povas profunde kompreni kaj ili bedaŭras, ke dialogo ne antaŭeniras plu.”

Ambaŭ sentas malfacilecon por komnikado reciproke. Koutoku Ŝusui, preleganto en la Unua Kurso, bedaŭrinde pro malkomunikado, diris, ke per uzado de Esperanto estos pli komnikebla inter ili. La Ĉinaj ankaŭ ekinteresiĝis pri Esperanto, Zhang Ji prelegis en la 7-a Kurso pri la temo de “La propono de Esperanta eduko”.

En 1908, severe persekutite de Japana Publika Sekureco, Zhang Ji forlasis Japanion kaj ekveturis al Parizo, kie li alliĝis al la grupo “*La Tempo Novaj*”, kiun fondis Wu Zhihui 吳稚暉, Li Shizeng 李石曾, Chu Minyi 褚民誼, Zhang Jingjiang 張静江. Post la fondiĝo de Ĉina Respubliko Zhang Ji 張繼 fariĝis prezidanto en la Ĉambro de konsilistoj en 1913.

Rilato de Oosugi kun ĉinaj Esperantistoj daŭris eĉ poste de Ĉina Revolucio en 1912. Kantono estis la bazloko de E-movado de sudaj provincoj kaj ludis gravan rolon en la frua movado kune kun Ŝanhajo kaj Pekino. En 1909, Xu Lunbo 許論博 funkciigis en Kantono E-kurson kaj vesperlernejon kaj elbakis nombron da fidelaj esperantistoj, kiaj Huang Zunsheng 黃尊生. Liu Shifu 劉師復 kaj Ou Shengbai 区声白, kaj ili poste ludis spinan rolon en la ĉina E-movado. Aŭtune de 1912, Xu, Liu kaj Huang fondis la Kantonan Esperanto-Asocion. Laŭdire, Zamenhof sendis gratulleteron al ili kaj ankaŭ donacis E-librojn. En 1913, Liu Shifu en Kantono ekaperigis la revuon *La Krio de Koko* 晦鳴錄 por propagandi socialismon kaj Esperanton. Ekde la n-ro 3, la revuo prenis la novan nomon *Voĉo de la Popolo*. Liu Shifu fondis en Kantono(Guangzhou) socialisman propagandan gazeton “*Hui Min Lü*” 晦鳴錄(alia nomo « *Voĉo de la Popolo*” desde 1913).

Inter Oosugi kaj Liu Shifu estis korespondo. Sur la revuo “*Moderna Ideo*”(近代思想 vol.2, n-ro 4, 1914 januaro) Oosugi atestis ke ili interŝanĝis leterojn.

“Letero en Esperanto alvenis al mi de s-ro Shifu el Makao(Aomen). Li antaŭe publikis en Guanzhou anarkiistan revuon “*La Voĉo de la Popolo*” Esperante kaj ĉine, sed estis persekutita de la registaro de Yuan Shikai kaj ankaŭ ĉi-tie en Makao estas malpermesite de Portugala registaro publiki revuon. Malgraŭ tio li intencas iel publikigi ĝin en proksimo. Li sendis al mi revuojn kaj pamfletojn, kiuj estas admirindaj kaj plenaj de sango, ekzemple, “Trezora floso de Militantoj”, “Ekskluzivu militarismon” de Alfred Russell Wallace, “Kontraŭ patriotismo” de Gustave Herbe, “Mizero de konskripcio” de Portalle, “La sociala revolucio estas la tasko de militistoj”. Mi ankaŭ volas kontribui iam en la revuo.”

Oosugi mem ne kontribuis en ĝi, sed li admonis s-ron Jamaga Taiĵi helpi al Liu Shifu. Oosugi scribis en la leteron en 1914:

“Ĉina samideano Shifu sekrete eniris en Ŝanhajo kaj komencis publikigi revuon de anarkiista movado “*Voĉo de la Popolo*” Esperante kaj ĉine. Vi iru helpi al li.”

Jamaga veturis en Ŝanhajo kaj havis kontakton kun Liu Shifu.

16-an septembro de 1923 Oosugi estis mortigita de ĝendarma kapitano Amakasu. Eĉ en Guanzhou estis okazigita la funebra mitingo 25-an de oktobro, en la revuo “*Printempa fulmo*”(10-an de decembro en 1923) publikiĝis sekva priplora vorto:

“Unu stria lumo ŝiris obskuran nubon en la oriento. Sklavoj ekvekiĝis, la lasta tago por demonoj venos baldaŭ. S-ro Oosugi estas la homo, kiu hisis torĉon en nigra nokto kaj elparolis voĉon dum la ĉirkaŭa muteco. S-ro Oosugi mortiĝis. Sed la afero plenumita de li por la proletaro ne mortos por eterne, la orientaj popoloj ne forgesos pri s-ro Oosugi por ĉiam.”

Bakin, fama verkisto, skribis en la revuo “*Printempa fulmo*” (春雷 1-an de majo en 1924) sekvan poemon, titolitan “Granda martiro”.

Granda martiro,

Fermu okulojn!

Via voĉo restas por eterne en nia koro,

Flago penetrigita per viaj sangoj nun estas en niaj manoj.

Ni, tenante ĝin supren, marŝos laŭ la vojo al libero!